

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum la pasintaj semajnoj ni komencis prezenton de la libro *Les Patries [La Patrioj]* verkita de Jean Diedisheim, aŭtoro konata de la mondfederalistoj. Tiu studo estas interesa komplemento al *Interpopola konduto* de Edmond Privat, verko bone konata de la esperantista legantaro.

A.- « *Kiam la ŝtatoj, per la organo de siaj ministroj, delegitoj kaj agentoj, kunvenas por konfronti siajn vidpunktojn, por mildigi la perturbojn en la internacia socio, por plibonigi politikajn aŭ ekonomiajn rilatojn, tiu objekto ne estas ilia nura zorgo. Ĝi eĉ ne estas la ĉefa. Pro tio la organizo de internacia paca kunvivado ĉiam fiaskis.* »

Cl.- Post tiu rimarko Jean Diedisheim daŭre priskribas la nunan situacion. « *La unua celo de la nacioj estas la propra nacia zorgo. La ĉefa rolo de la ŝtatrepresentantoj estas atentegi pri la bezonoj, intereso, avantaĝoj kaj prestiĝo de la propra nacio.* »

A.- Oni bone komprenas tiun zorgon. Ĉu la ŝtatrepresentantoj ne ricevis la taskon reprezenti ŝtaton?

Cl.- Jean Diedisheim tamen rimarkigas, ke tiu reprezentado ne sufiĉas al la ŝtatrepresentantoj. Por la malfeliĉo de la homogenro, la ŝtatregantoj plie volas preni sur sin la organizon de alta internacia polico. Ambaŭ funkcioj : defendi proprajn naciajn interesojn kaj starigi internacian policon – sin kontraŭas. Oni samtempe ne povas servi du mastrojn ! »

A.- Jean Diedisheim analizas, kiel la registaroj provas funkciigi la internacian policon, kaj kial ili neniam sukcesis. Tiu parto de lia verko ŝajnas al ni tre grava. Tial ni ĝin atente resumas :

Cl.- La altan internacian policon la ŝtatoj penas asekuri plurmaniere.

A.- En bonege difinitaj kaj fakaj laborkampoj pli aŭ malpli sukcesas ilia zorgado. Ni menciuj la planadon pri nutrado, profilaktan antaŭgardon, civilan aerflugadon, internacian krediton, labornormigon, arbitradon de nepolitikaj interŝtataj kontestoj.

Cl.- Por la problemoj tuŝantaj ĝeneralan politikon la registaroj aranĝas ambaŭflankajn konversaciojn, interŝanĝas diplomatajn notojn, kunvenas en internaciaj konferencoj aŭ renkontiĝas en la Asembleo aŭ Konsilantaro de Unuiĝinta Naciaro. Ni tuŝas tie la aferon de ilia bankroto.

A.- « Ĉu ili povas samtempe defendi egoisme naciajn interesojn, kaj ilin subigi al la internaciaj intereso; ĉu ili povas serĉadi la sukceson de la propra nacia kaŭzo kaj samtempe, por la sama punkto, proklami la superecon de la monda komuneco ?

Cl.- Oni ne ankoraŭ vidis ministron, ŝtatdelegiton, kiu por favorigi la ceterajn naciojn, akceptas malavantaĝi la sian.

A.- Inverse oni vidis multe da ministroj grave malutili al la internacia komuneco por servi la propran landon.

Cl.- Cetere kontrolas tiujn ministrojn kaj ŝtatdelegitojn en la propra lando la publika opinio, la gazetaro kaj la parlamentanaro, tri fortoj ĉiam pretaj kondamni.

A.- Ministro, kiu preferus la mondan komunekon al la nacia, riskus sian karieron. Kaj cetere nenio pretiĝis lin al tiu ago. Li atingis sian funkcion pro sia naciema agado.

Cl.- *La samaj homoj ne povas samtempe defendi kaj foroferi la samajn interesojn. Tion oni ne povas riproĉi al ili.*

A.- *Oni tamen povas riproĉi ion : la persistemon de la registaroj okupiĝi pri la arbitrado de la mondaj demandoj. Ili volas ludi supernacian rolon, kaj tiun rolon ili aĉege ludas por la malprofito de la tuta homaro. »*

Cl.- Tiurilate Jean Diedisheim citas la opinion de mondkonata juristo kaj sociologo, Georges Scelles, kiu diras :

A.- *« Oni ne povas peti al la regantoj, kies unua devo estas la defendo de la propraj naciaj interesoj – kaj ilin ĵaluze, subtile aŭ eĉ ĉu necese akre defendi – konsenti al forlaso de suvereneco. Tamen tiuj forlasoj de suvereneco fariĝas nepre necesaj por la realigado de la internaciaj interesoj. »*

Cl.- Jean Diedisheim prave aldonas : *« Se oni ne povas atendi de la regantoj tiun forlaseman sintenon dum normala tempo, ĝin esperi dum armita konflikto aspektas vere freneze. »*

A.- Por Jean Diedisheim la starigo de tutmonda federa aŭtoritato dependas de absoluta ago : la rompo de la kumulo inter la samaj manoj de du malsamaj ordoj de respondecoj absolute neakordigeblaj.

Cl.- Iam venos la tempo, kiam la homoj komprenos, ke estas necese konfidi paralele la oficon de la naciaj aferoj al ŝtatrepresentantoj kaj la oficon de la supernaciaj interesoj al aliaj personecoj : sociologoj, juristoj, ekonomiistoj, biologoj, financistoj, edukistoj, ktp. elektitaj pro sia planeda mondkompreno kaj homamo kaj kapablo subordigi la propran nacian civitanekon al la interesoj de la monda civitaneco.

A.- Kontraŭ tiu necesega paŝo nun precize kontraŭstaras la sankta kaj netuŝebla dogmo de la nacia suvereneco.

Cl.- La naciaj ŝtatoj spite de du mondaj militoj kaj tria en pretiĝo ne akceptis rezigni parton de sia tutpoveco. La absoluta suvereneco estas por la nacioj la plej alta idealo, la plej valora emblemo.

A.- En tiu situacio Jean Diedisheim alvenas al la konkludo, ke lukti kontraŭ la dogmo mem estas vane. Kio fariĝos absolute necesa, estos lukti kontraŭ la nuna formo kaj strukturo de la naciaj ŝtatoj, kiuj estas la nutrantoj de la dogmo de la absoluta nacia suvereneco.

Cl.- La venontan semajnon dum lasta prelego dediĉita al tiu libro *Les Patries [La Patrioj]* ni donos aliajn konkludojn de Jean Diedisheim.

A.- Antaŭ ol forlasi vin, ni volas saluti kelkajn germanajn aŭdantojn, kiuj skribis : Ili estas sinjoroj Bruno Gahler en Glinde, J. Kondor en Lampertheim kaj Bruno Siegert en Fürth.

Cl.- Vi aŭdis elsendon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-